MARTINUS INSTITUT

# Kosmos

N-ro 2 - 2013


## LA KOSMOLOGIO DE MARTINUS

**Martinus:**
Demanda leciono. Ĝardena festeno ĉe Vilao Rosenberg, julio 1973

**Martinus:**
La geedzeco

**Erik Gerner Larsson:**
Martinus 11, La akceptemo de la homaro rilate al la nova mondimpulso 3

**Ole Therkelsen:**
Profetaĵoj pri Martinus 3, Uri Geller kaj Puharic



© Martinus Institut 1981 Reg. 66

Esperanto

**Enkonduko fare de la konsilio al la artikolo kaj la sekvanta letero**
Ĉi artikolo baziĝas je sonregistraĵo de demanda leciono en la ĝardeno de Vilao Rosenberg en julio 1973. Post 1970 Martinus ne plu faris ordinarajn prelegojn, sed li faris paroladon ĉiujare ĉe la stud-sezona inaŭguro en Klint, kaj dum la festado de sia naskiĝtago. La ĉi-okazaj paroladoj ofte disvolviĝis en prelegojn. Krom tio, li en 1973 invitis la kursanojn al kelkaj demandaj lecionoj, tiel ke ili povu renkonti kaj saluti lin. Ĉi demandaj lecionoj estis aranĝitaj en la ĝardeno de Vilao Rosenberg, en kies apuda dometo Martinus loĝis – oni ankaŭ nomis la dometon *Martinus' hus* (*la domo de Martinus*). Tial la nomo "gardenparty", *ĝardena festeno*.

La demandaj lecionoj estis inspiraj someraj okazaĵoj ĉar ilin karakterizis aparte intima kaj humura etoso. Martinus ĝuis interŝanĝi pensojn kun la interesatoj en tia libera formo, kaj li ankaŭ ĝojis pri tio, ke ĉeestis ne malmultaj junuloj. En siaj respondoj, li foje menciis novajn nuancojn en siaj analizoj, kaj prezentis defiojn al la rutinaj konceptoj de la ĉeestantoj. De tempo al tempo, li sin esprimis pli sukoplene kaj uzis vortojn kaj formulojn, kiuj estis pli rektaj kaj ĉiutagaj, ol la stilo en liaj prelegoj. Sed li faris tion kun sia karakteriza humuro kaj ĉiam ama toleremo kaj akceptemo al la multaj stadioj, kiujn ni homoj devas travivi dum la evoluo.

Nun, kiam jam pasis multaj jaroj, ni vidas kreskantan intereson ne nur rilate al la libroj, sed ankaŭ por postlasita materialo el aliaj formoj. El la tiamaj ĝardenaj demandaj lecionoj, unu estis surbendigita, kaj tiun ni decidis prilabori al artikola formo, tiel ke ĝi fariĝu alirebla al pli vasta rondo da interesatoj. La prilaboro de la dana transskribaĵo de la origina sonregistraĵo fare de Aage Hvolby, Torben Hedegaard kaj Ole Therkelsen estas aprobita de la konsilio en marto 2009. Ĉiu demando estas provizita per tema titolo, kiu respegulas la ĉefajn punktojn de la respondo. Ni aldonis notojn pri la diversaj temoj kaj ankaŭ aldonis kelkajn redaktajn indikojn, kiuj reflektas la specialan etoson, ekzemple ridado kaj aplaŭdado fare de la aŭskultantoj.

Kiel aldonan inspiron rilate al la temo sekseco kaj familia vivo, ni prezentas en ĉi tiu numero, personan leteron de Martinus, en kiu li respondas ĉi-teman demandon de interesato.
Krom la nomo de la ricevanto, la letero ne estas redaktita.

*La konsilio 2009*

Traduko: Henning Sato von Rosen 2013



# Demanda leciono. Ĝardena festeno ĉe Vilao Rosenberg, julio 1973



**1. Temoj: Mondmilito, mondŝtato**

**Demando:** Ĉu nin atendas katastrofoj kiel militoj?

**Martinus:** Okazos militoj, sed en Skandinavio ni ne timu. La militoj ne ĉesos antaŭ kiam la homoj iĝos militrifuzantoj. Tiuj jam estas multaj, sed ankaŭ estas multaj kiuj ankoraŭ tion ne volas. Atendas nin du grandaj mondmilitoj. Mi opinias ke post 500 jaroj la militoj estos pasintaj, kaj tiam multaj landoj estos unuiĝintaj – je UN [Unuiĝintaj Nacioj] kaj simile. La landoj pli kaj pli unuiĝas, kaj finfine la mondo iĝos unu ŝtato. Antaŭ tio, tute ne povas regi paco en la mondo, kaj antaŭ tio ne povas esti la ĝusta administracio. Kiam la mondo iĝos *unu ŝtato*, estos *unu lingvo*, kaj tiam estos multe, multe pli facile, kiam oni ne plu bezonos tiujn tradukojn ĉiujn. Multan tempon oni gajnos kiam ĉiu komprenos ĉiun.

**2. Temoj: Skandinavio, kosmaj mondimpulsoj, la lernejo de la vivo**

**Demando:** *Martinus, vi diris antaŭe ke nenio okazos al Skandinavio se estos mondmilitoj, ĉu vere?*

**Martinus:** Skandinavio estas la plej alte evoluinta parto de la terglobo, kaj la popoloj de Skandinavio estas la plej alte evoluintaj en la tuta mondo. Tion agnoskas ja ankaŭ diversaj aliaj. Ekzemple, kelkaj diras *"Skandinavio! Danio! Tio estas nia idealo. Tion ni alstrebas kiel ekzemplon."*

Skandinavio estas trafata de impulsoj el centro en la lakta vojo. Sed kia centro tiu estas? – Oni komprenu ke ekzistas multaj altevoluintaj, loĝataj planedoj, kiuj estas finaj mondoj, kie la homoj estas iĝintaj finaj homoj. Oni povas diri ke tiuj terenoj konsitigas la ĉielan regnon. La planedoj estas vivaj estuloj, kiuj interparolas. Nu, paroli ne estas la plej taŭga nocio; ili interŝanĝas konscion pere de radioj kaj ondoj, sed tion ni ne povas senpere kompreni. Kiam la planedo diras "jes", povas daŭri 200 jarojn, kaj unu vivdaŭro tiel ne estas sufiĉe longa por ke ni povu paroli kun la terglobo. Sed la terglobo povas paroli kun alia planedo, kaj la korespondado de la planedoj ofte speguliĝas en la kulturoj, kiuj pasas sur la tero. Multaj grandaj kaj malgrandaj kulturoj pasis sur la tero, kaj ili egalas la pensojn de la tergloba konscio. Nun la terglobo korespondadas kun altevoluinta planedsistemo, kiu havas kosman konscion. Kiam mi donas al vi kosmajn informojn, iras en vin kosmaj impulsoj, kaj tio okazas ankaŭ, kiam pli alta mondo sendas kosmajn impulsojn en la terglobon. Ili efikas en la terglobo kiel grandega vivigo de kulturoj kaj moralo, inventoj kaj evoluo – kaj ĉio kio okazos.

La terglobo liberiĝis. Oni povas diri ke la moralo liberiĝis, sed kie estas la moralo? – Nun homoj devas troĝui tiom

kiom ili povas, ĉar pri kio ili ne troĝuas, pri tio ili ne povos distingi inter bono kaj malbono. Ili devas lerni vidi la diferencon. Ne helpas diri ke oni tion aŭ alion ne rajtas! La homoj devas lerni tion kiel spertitajn faktojn. De la komenco estas ja dirite ke oni devas ĝui la fruktojn de la arbo de scio. La arbo de scio ja estas la ĉiutaga vivo, kie ni, ekde mateno ĝis nokto, ĝuas la fruktojn forme de ĉio kion ni spertas. Kiam oni iel agas, kaj malkovras ke tio kion oni faris estas tre ĉagrena afero, tiam oni ja ne tion faru denove. Aliflanke oni ankaŭ fojfoje povas sperti: "Ho, kiel agrable estis tio!"

Tiamaniere ni instruiĝas dematene ĝisnokte. Ni estas en grandega lernejo, kie ni konstante paroladas kun Dio. Ĉio kio estas ĉirkaŭ ni ja parolas sian lingvon. Sed plejmultaj homoj tion rigardas kiel analfabeto rigardas libron. Li vidas nur la inkon sur la papero, sed tiu kiu povas legi, spertas la fabelon kiu troviĝas en la libro. Estas same, kiam vi estas lernanta legi kaj komencas kompreni la fabelon malantaŭ la susuro de la ventego, la ondoj de la maro, la vulkanoj kaj ĉio kio sin movas tie ĉi en la mondo. Ĉio ne estas nur kia ĝi ŝajnas. Estas vere laŭcela konscio, kiu prezentiĝas al la vivaj estuloj, kaj bestoj kaj homoj, por ke ili povu evolui. Ĉio estas viva funkcio.

**3. Temoj: Formortantaj bestospecioj, la nova mondimpulso**

**Demando:** *La formortigo de diversaj bestospecioj, kiu nun okazas, ĉu ĝi iel rilatas al la evoluo?*

**Martinus:** Prave, ke multaj bestospecioj estas minacataj de formortigo. Mi opinias ke restas nur 400 rinoceroj en Barato. Iĝis absolute malpermesite ilin pafi. Nun oni devas teni multajn el la bestoj en rezervejoj por ilin konservi.

Iom post iom, vico da bestospecioj formortos, kaj tio altgrade rilatas al la evoluo. Enkarniĝos aliaj bestospecioj. Mi ne cerbumis pri kiaj bestoj estos. Mi povas nur diri, ke estos pacaj bestoj, kiuj povas vivi kun pacaj homoj, tiel ke ni ne bezonos uzi pafarkon nek aliajn pafilojn. Okazas tute nature, ĉar la terglobo estas viva organismo evoluanta.

La terglobo troviĝas en la granda naskiĝo, mianocie, kaj ĝi tial devas forigi ĉion mortigan, ĉion malluman. Same homoj devas fari, por povi ricevi la grandajn spiritajn fortojn en sin, kaj sperti la grandan naskiĝon. La terglobo jam ricevas grandajn fortojn el la centro de la lakta vojo. Tiuj impulsoj komencis la evoluon. La unua impulso venis je la jarcenta transiro. La alia venis en 1920. Kaj venas alia nun. Ĝi komenciĝis, kaj ĝi multe rapidigos la evoluon. Aperos multaj rimarkindaj aferoj, kiujn la homoj hodiaŭ tute ne imagas.



**4. Temoj: Kosmaj ekbriloj, alkohol- kaj drogmisuzo**

**Demando:** *Mi renkontis homojn kiuj spertis kosmajn ekbrilojn, kaj ili opinias ke ili atingis tiel longe, ke ili ne bezonas esti tie ĉi sur la terglobo la venontan enkarniĝon, sed iros plu antaŭen. Kaj nun la demando: Ĉu ne ĝuste estas tiuj homoj tre evoluintaj, kiuj devas reveni por esti instruantoj tie ĉi?*

**Martinus:** Se homoj spertas kosmajn ekbrilojn, tio indikas ke ili bone avancis en la evoluo. Sed oni povas sperti kosman ekbrilon longe antaŭ ol oni estos finevoluinta. Tio signifas nur ke oni je certa kampo de sia konscio atingis certan altecon, kie oni povas ricevi fortojn kiuj povas kaŭzi kosmajn ekbrilojn, ekzemple forme de kosma scio. Povas okazi ke oni subite sentas agrablajn lumon kaj varmon, kaj poste oni scias sendube ke oni estas senmorta. La spertintoj de tio ne vere povas klarigi la aferon, sed ili scias, ke ili estas senmortaj. Multaj spertas kosmajn ekbrilojn kaj ricevas rezultojn pere de la intuicio. Ankaŭ mi ricevas ĉiujn miajn rezultojn per la intuicio, sed mi havas la kapablon per mia inteligento klarigi ilin, tiel ke ili konformas al viaj spertoj, ĉar alikaze vi ne povus uzi tion, kion mi prezentas.

Sed oni devas esti singarda, ĉar multaj spertos kosmajn ekbrilojn falsajn. Ĝuste kontraŭ tio avertis Kristo. Kelkaj venis al mi por ordiĝi post siaj spertoj. Nun homoj ja informiĝis pri tio ke oni povas sperti kosman ekbrilon, kaj tial facile kredas ke ili spertis ĝuste tiun inicon.

Iun tagon viro venis al la oficejo de la instituto por paroli kun mi. La kunlaborantoj timis lin, kaj diris: *"Venis viro. Li estas freneza. Li volas paroli kun vi."* – Mi lasis lin veni supren, kie mi loĝas. *Li rakontis: "Nun mi havas kosman konscion kiel vi. Mi apartenas al "La Fluganta Korpuso."* [Ridego] *Vi nur sidas tie, sed mi devas esti tie kaj ĉi tie."* Kun grandaj gestoj. Tio ja estis tute bone, kaj la viro trankviliĝis.

Du jarojn poste iu frapis la ĉefan pordon. Mi estis sola hejme. Estis li denove, kaj li diris: *"Mi estis tute freneza tiam."* Kaj mi respondis: "Jes, ne malproksime de tio." [Rido].

Iam alia viro venis al mi, kaj li diris ke li estas mense tre malstabila, ĉar li spertis kosman ekbrilon. Nu, li vidis anĝelojn en la neĝoamasoj. "Ĉu vere? Certe estas bone tiel vidi anĝelojn." Mi parolis kun li pri tio kio okazos estontece, kaj ke mono estos forigita. *"Jes, ĝin mi jam forigis en la spirita mondo"*, li diris. [Rido] "Estas ja bonege", mi respondis, "do tio jam estas solvita."

Tria viro vokis min el provinca urbo: *"Ho, mi devas paroli kun vi. Mi spertis tre grandan aferon."*

"Aha, ĉu vere?"

*"Jes, mi vere devas paroli kun vi."*

"Pri kia sperto temas?"

*"Vi jam scias. Vi scias pri kia sperto temas."*

"Mi ja ne scias."

*"Jes, vi bone scias."*

"Nu, almenaŭ ne temas pri la granda naskiĝo."

Sed estis tio kion li celis. Mi sciis ke li estas drinkemulo, do ne povis esti la



granda naskiĝo. Tamen li volis veni al mi, do mi diris: "Sed tion vi ne bezonas. Kiam vi spertis la grandan naskiĝon vi ne bezonas paroli kun mi." – Sed li tamen venis. La viro havis fulmantajn okulojn, kaj li strange aspektis. *"Mi havis grandan sperton. Sed mi devas iom drinki, ĉar alie mi ne povas tion elteni."* Sed tio estas la plej malbona kion oni povas fari, ĉar tio ja estas grava veneno por la kosmaj organoj. Estas ĝuste tio, kio estas tiom danĝera pri drogoj kaj alkoholaĵo.

La junuloj ja ne scias kiel tiuj substancoj efikas al la cerbo, sed ili influas al la kosmaj, intuiciaj organoj, kiuj devas doni al ili kosmajn ekbrilojn kaj poste kosman konscion. Tiuj organoj ne estas evoluintaj, sed evoluantaj. Se oni konsumas venenaĵojn kiuj efikas al ili, tio influas al la menso, kaj la sensoj trompiĝas. Oni povas mensleviĝi, kaj oni povas menspremiĝi. Fine oni povas iĝi mensa kriplulo, se oni ne ĉesas. Povas daŭri plurajn jarojn leviĝi de tio, kaj la damaĝoj povas onin sekvi plurajn vivojn antaŭ kuraciĝo. Tio, kion mi volas diri al vi rilate al kosmaj ekbriloj, estas ke vi povas ilin fidi, se vi estas humila kaj ne fanfaronas, ke vi estas tiom kaj tiom granda. Tiukaze vi povas fidi, ke ili enhavas iom da vero.

**5. Temoj: Polusa transformiĝo, samseksemo, besta kaj homa seksecoj, karesekseco, preventiloj**

**Demando 5A:** *Estas persono ĉi tie, kiu diras ke vi skribis, ke samseksemo povas rezultigi mensan kriplecon, sed tiuj kiuj estas tre amemaj kaj avance evoluintaj supozeble ne falos en mensan kriplecon, ĉu?*

**Martinus:** Mi tute ne skribis, ke samseksemo povas rezultigi mensan kriplecon. Mi skribis, ke samseksemo estas natura stato.

Ni ĉiuj havas en ni du polusojn, sed kiam ni komenciĝis kiel simihomoj la mala poluso, nome la femala en la viro kaj la maskla en la virino, estis latenta. Tial dominas la maskla poluso en la viro kaj la femala poluso en la virino. Sed laŭ la evoluo la mala poluso kreskas, kaj estas tiu, kiu laŭtempe evoluigas la homon al la vera homo. Kiam vi ĉiuj sidas ĉi tie kaj interesiĝas pri tiuj ĉi aferoj, la kaŭzo ne estas via ordinara poluso, sed la mala poluso, nome la maskla en la virino kaj la femala en la viro.

La du polusoj havas ambaŭ sian centron, unu en la cerbo kaj la alia ĉe la seksorganoj. Ili evoluas, ĝis kiam ili atingos ekvilibron. Kiam la femala kaj la maskla polusoj estos samgrandaj, la homo iĝos kosme konscia. Tiam ĝi ne plu estos ligita al la besta regno, kaj ĝi povas ami sendepende de sekso, tiel ankaŭ sian propran sekson.

La nocio samsekseco dum multaj jarcentoj sonis terura, tiel ke la homoj, kiuj sentis inklinon ŝati samseksulojn, ne kuraĝis tion montri. Ja estis punata afero. Tiel la samseksemuloj estis premataj, kaj aperis multaj troigadoj kaj perversecoj. Ekzemple estas viroj kiuj estas treege inaj. Ili paŝetas kaj sin ŝminkas. Estas kompreneble ke tia troigo donas al homoj strangan impreson, kaj tiel samseksemeco ekhavis la ŝajnon ke tio rilatas al la perversaj homoj kaj tiaj aferoj – sed tio ne estas la vero!

La vera, normala samseksemulo estas tre evoluinta. Ĝi ja egalas duoblan amon. Kial la samseksemulo ŝatas samseksulon? – Ja, tio estas tre natura afero, kaj tion homo ne atingas antaŭ ol la mala poluso atingas la cerbon, kaj oni komencas esti tiom konscia je tiu poluso, kiom ĝi estas je sia ordinara poluso. La homoj ja ĉiuj estas konsciaj je sia ordinara poluso, nome la viro je sia maskla poluso, kaj la virino je sia femala poluso. La ordinara poluso de la estulo estas tiu, kiu ebligas geedziĝon kaj ĉion, kio

temas pri la idoj. Se la mala poluso ne estus kreskinta en la homoj, ili ankoraŭ estus simioj aŭ primitivaj bestoj hodiaŭ. Estas la mala poluso kiu altigas la estulon, kaj ĝi ankaŭ postulas seksan kulminon.

Kio estas sekseco? – Kio konsistigas tiun dian plezursenton, kiu estas la plej alte perceptebla agrablo, kiu entute ekzistas? – Nu, tio estas la spirito de Dio mem. Sed la dia spirito estas konformigita, tia ke ĝi ĉe la bestoj kaj ankaŭ ĉe la homoj spertiĝas dum la seksspariĝado aŭ la kulmino de la seksumo. La spirito de Dio kaŭzas tiun plezursenton, kaj per ĝi Dio regas la bestan regnon kaj la homaron. Kio plezurigus la bestojn se ili ne havus la seksspariĝadon? – Se ne estus ia seksspariĝado, ni ne plu aŭdus birdokantadon. Kaj kiel pri la homoj? – Ili ja enuus ĝismorte, se ili ne povus ... [dronas en ridego].

Sed nun okazas granda ŝanĝiĝo, ĉar la mala poluso kreskas en la homo. La terglobo estas globo, kiu estas en la proceso de finevoluiĝo, kaj la homoj ankaŭ estos finevoluintaj post malmultaj vivdaŭroj. Tial ja ne estas strange ke multaj komencas konsciiĝi je sia mala poluso. Ĉio kio situas ekster la intereso de la geedziĝo, nome intelekteco, scienco, spiritaj interesoj ktp., devenas de la mala poluso. Kial la homoj eksimpatias samseksulojn, atinginte konsciiĝon je la mala poluso? – Nu, tio ne estas tiom stranga afero! Kiam la femala poluso de viro kreskas ĝis la cerbo, kaj li konsciiĝas je ĝi, tiam li komencas havi simpation, kiel virino, al viroj. Kaj kiam la virino konsciiĝas je sia maskla poluso, ŝi komencas, kiel viro, havi simpation al virinoj.

Tiu stato ne estas io kio daŭros. Ĝi nur daŭras dum la periodo, kiam la polusoj malekvilibras. Kiam la polusoj estos tute ekvilibraj, la homoj estos finaj homoj.

*"Kion pri la sekseco?"*, homoj demandas, *"ĉu ĝi ĉesos?"* – "Ne, ĝi multobliĝos! – Vi ne timu!" [granda rido kaj ĝojeco] Sed estos je pli pura formo. Kia do estos tia sekseco? – Nu, tion ni povas eksperti jam nun. Antaŭ multaj jaroj mi spektis filmon, en kiu oni unuafoje montris la longajn kisojn. Ili daŭrigis kisadi unu la alian, tre longe. Tio estis afero nekutime vidata, sed nun tio ja iĝis tre kutima. Okazas tio, ke tiu ĉi dupoluseco igas la organismon tre sentema. Multaj homoj sentas grandan ĝuon de kareso, ĉu ne? – Mi tion ankaŭ sentas. Mi sentas ĝuon renkonti homojn. Estas granda agrablosento.

Se ni rigardas pornografiajn bildojn kaj simile, aspektas ja terure. Sed kion oni vidas, se oni ne estas analfabeto? – Oni vidas, ke elkreskas en la organismo granda seksa sento. Tiu seksa



sento vastiĝas en la tutan korpon. Ĝi ne daŭras nur kiel sento tra gutboteleto kia la peniso, kiel nun estas ĉe la bestoj kaj la nefinaj homoj [rido].

Kiam la homoj iĝos dupolusaj, t.e. finaj homoj laŭ la bildo de Dio, ili ne plu havos ĵaluzon, kaj ili ĉiu ŝatas ĉiun. Tiu sekseco, kiu tiam ekzistos, estas la spirito de la viva Dio, kaj estos ĝuo renkonti unu la alian. La homoj ne plu uzos kontraŭkoncipajn pilolojn nek aliajn teruraĵojn kiujn ili nun uzas. Tio ja estas io, kion inventis la homoj, kaj ĝi estas terura eraro. Aperos post kelkaj jaroj strangaj aferoj el tio, kiam ĝi estos tre disvastiĝinta. La naturan kaj rektan vojon prizorgis la providenco provizante homojn per granda korpa sentokapablo. Multaj virinoj ĝuas reciproke sin karesi, kaj multaj viroj ankaŭ ĝuos karesi unu la alian. Viroj kaj virinoj ankaŭ povas karesi unu la alian.

Multaj homoj nun atingas stadion kiam ili ne volas geedziĝi. Ili ne volas ligiĝi, kaj ili ne volas infanojn. Ili ne konformas al tio, havi infanojn. Ili volas la sekskuniĝon, sed laŭ kosma vidpunkto ili tion ne rajtas. Ili rajtas la seksan ĝuon, ĉar ĝi estas dia, sed tiu tekniko, kiun aplikas la besto, ĝia nura celo estas ke la spermo atingu la virinon kaj ŝin gravedigu. Estas tekniko kiu malkreskas, kaj ĝi jam estas tiom malkreskinta ĉe multaj viroj kaj virinoj, ke ili ne kapablas sekskuniĝi. La estonta evoluo karesigos la homojn. Ili tiom sentiviĝos, ke ili karese atingos sekskulminon, sen apliko de tiuj teruraĵoj, kaj do ne restos malbona konscienco poste. Kaj virinoj ne iĝos tropezaj nek ekhavos trombozojn pro engluto de kontraŭkoncipaj piloloj.

Ni ja havas ankaŭ la aliajn “aparatojn”, el kiuj la plej mildaj verŝajne estas tiuj “kaŭĉukaĵoj”, kondomoj kaj pesarioj. Sed mi volas diri ke ankaŭ la uzo de tiuj enhavas malobeon de la naturaj leĝoj. Tial estas tute natura afero, ke estas homoj kiuj ne volas geedziĝi, kaj kiuj ne volas infanojn nek la tutan familian vivon. Estas indiko ke la besta konscio forestas.

La homoj ne estis instruataj pri la homa sekseco, do ili kredas, ke ne ekzistas alia vojo. Iĝis miljara kutimo, ke la virino kuŝu riceveme, kaj ke tiel estu por la viro [multa rido]. Sed ja estas stulte kredi, ke tio estas la absolute nura beatigo. Kiam ili komencos alimaniere karesi unu la alian, ja ekestos kolosaj amuzludoj ... [Martinus ne aŭdeblas pro ridegoj]. Nu, eble ŝajnas stultaĵo, sed estas la vero. Ĉio tio baziĝas sur amo.

Sed tiel ne estas pri la kontraŭkoncipa pilolo. La junulinoj malkovris ke se ili nur uzas la pilolojn, ili povas vizitadi virojn, same kiel ili siatempe vizitadis virinojn. Kaj kio do okazas? – Ofte tamen ekestas infanoj. Mi vidas ke ne damaĝas ke junuloj kunloĝas kaj ĝojas loĝi kune. Tion oni ne povas kontraŭdiri, ĉar estas pli bone ol geedziĝi, se oni ĉiukaze malgeedziĝos poste. Sed ili ne bredu infanojn en tia rilato. Kiu prizorgos la infanojn, kiam la gepatroj kuros for unu de la alia kaj kunvivos kun nova partnero? – Tion faros la ŝtato, kaj por tio ĝi ankaŭ estas preparata. Nun multaj homoj edukiĝas kiel infanzorgistoj kaj simile. Tio estas celata al la estonto. La providenco scias kio venos. La providenco ja estas longe antaŭ la homoj.

Tio kion mi diris eble sonas timiga, sed mi esperas, ke vi komprenas. Temas ja pri amo.

Kial viro kaj virino, kiuj ŝategas unu la alian, uzu tian teknikon, kiu estas tiom danĝera, kaj kiu damaĝas la organismon kaj kontraŭas la leĝojn de la naturo? – Ne estas nekredeble ke tiuj homoj havas bonegan kaj grandan konscion kaj eble komenciĝantan kosman konscion. Kiam ili laŭtempe atingos senteti la alian poluson kaj iĝos tiel

nomate dupolusuloj aŭ samseksemuloj, ili ĉiukaze bezonos la karesan manieron, ĉar tie ili ne povas uzi la sekskunigan teknikon.

Mi konfesas ke miljaraj kutimoj ja ne facile malaperas. Sed estas pli facile ol oni kredas, kaj oni povas esti helpata de la providenco. Sed ne validas por ĉiu, ĉar oni memoru ke estas homoj, kiuj estas feliĉaj kaj ĝojas havi infanojn kaj vivi en geedzeco.

Mi pensas pri la miloj aŭ milionoj da junuloj, precipe tie ĉi en Nordio kaj en cetera Eŭropo, kiuj estas altgrade senzorgaj kaj uzas milionojn da tiuj aparatoj kaj aĵoj kaj novaj inventaĵoj, pri kiuj reklamoj logas homojn al uzado. Por kelkaj homoj, plej malbonkaze, tio rezultigas ke ili povas perdi la kapablon atingi la ĝuon de la spirito de Dio, la grandan plezuregon. Homoj diras pri la uzado de pesario aŭ spiralo: "Ne gravas". – Sed ja gravas! Eble ne multe en la fizika korpo, sed en la mentaleco. Oni memoru, ke estas granda spirita strukturo pri la seksumado, kaj ĝi damaĝiĝas pro la misuzo. Oni ne povas tiel ludi per tio. Sed ni devas pardoni la homojn, ĉar ili ne scias. Ja venis tre subite la tuta afero.

La vivo estas agrabla, nur kiam oni sukcesas ĝin ĝui ĝustamaniere. Kaj ĝi povas esti ĝuata sen aplikado de tiuj multaj diversaj tipoj da kontraŭkoncipiloj.

Oni ja komprenu, ke la homoj sin ligis al sortoj, kiujn ili devas sperti ĝisfine. Sed ja ekzistas dia forto en la preĝo, kiun homoj kunportas en tiu ĉi mondo, kaj kiu funkcias, ĉu oni tion kredas aŭ ne. Imagu, ke ni ricevis tian forton kiel naskiĝan donacon. Ĝi estas la plej granda magia forto kiu ekzistas. Ni povas preĝi kiam ni bezonas helpon, kaj oni povas ankaŭ peti helpon vivi sen kontraŭkoncipaj piloloj kaj ĉiuj tiuj fiaĵoj. Kial tiajn aferojn faras la homoj? – Tio ĉio ja estas malobeo al la kvina ordono.

**Demando 5B:** *Kio do estos la ideala tipo de kontraŭkoncipilo?*

**Martinus:** Ne estu helpiloj; oni povas karesi unu la alian per la manoj kaj alimaniere. Tio estas la natura maniero. Tiuj, kiuj ne trovas tion kontentiga, uzu la alian metodon, sed ili do estas ankoraŭ konformaj al tio, havi infanojn.

Se oni ne volas infanojn, kial oni do uzu metodon aŭ teknikon, kiu tiom danĝeras? – Kial oni batalu kontraŭ la naturon? – Se ni batalas kontraŭ niajn okulojn kaj tenas ilin fermitaj plejparton de la tago, ĉar ni opinias ke ni ŝparu la vidon, do la okuloj certe malboniĝos. Se ni ne promenas kaj ne uzas niajn gambojn, do ni certe havos malbonajn gambojn. Se ni nodfiksigas la brakon al la flanko, ĝi ankaŭ malboniĝos. Se ni haltigas la kosmajn fortojn de la seksa strukturo, ĝi damaĝiĝas. Tion la homoj ja ne povas vidi, sed mi esperas, ke mi povas atentigi pri la afero kaj montri kiel tio funkcias.

## 6. Temoj: La seksa ciklo, ĉiuj estas eternaj difiloj

**Demando:** *Vi skribas en via verko pri tio, ke ni ĉiuj estas eternaj difiloj. Per la vorto "filo" ni komprenas ion viran, ĉu ne? – Ĉu do ne tio apartenas al vira socio? – Kion faru ni virinoj? – Ni ja ne povas senti nin kiel eternaj difiloj!*

**Martinus:** Ne estas diferenco inter li kaj ŝi; ni ĉiuj estas difiloj. En la granda kosma spiralo ĉiuj efektive ĉiam havas du polusojn. Tio pri li kaj ŝi aperas nur en tre malgranda parto de la spiralciklo.

Ĉar ĉiuj homoj iĝos dupolusaj estuloj en la bildo de Dio. Kaj iliaj seksorganoj iĝos rudimentoj, same kiel la viraj mamoj nun estas rudimentoj. Jam hodiaŭ multaj homoj estas impotentaj kaj ne kapablas sukcesan sekskuniĝon.

Ne gravas ĉu oni estas viro aŭ virino. Estas la ekzakte sama afero. Oni ja estas viro ĉiun duan spiralon kaj virino ĉiun duan spiralon, kaj tiel la tuta seksa spiralciklo havas je sia dispono du spiralojn. Kelkaj opinias, ke oni estas viro ĉiun duan vivon kaj virino ĉiun duan vivon, por tiel ekvilibrigi la aferon, sed tio ja estas sensencaĵo, ĉar tio malekvilibrus. Kiel viro, kiu havas enorman barbon kaj kiu estas tre maskla kaj kruda je sia parolo, povus esti delikata etulino en sia venonta vivo? – [granda ridado].

**7. Temoj: Kadavrobruligado kaj enterigo, agmaniero pri bestetoj kaj mikroestuloj, grandkarmo, kosma konscio**

**Demando 7A:** *Mi opinias, ke Martinus skribis, ke rilate al sorto ne estas diferenco ĉu oni mortigas laŭ kutima, videbla maniero aŭ laŭ nevidebla, mikroskopa maniero. Ĉu rezultas similaj sortefikoj? – Tio do signifus ke ni havas tre pezan karmon antaŭ ni, ĉar ni ja multe damaĝas al la mikroestuloj en nia propra korpo. Kiajn sortoefikojn rezultigas mortigo de mikrokosmo en sia organismo?*



**Martinus:** Tiel efikas, ke se oni ekzemple lasas sian korpon bruligi, oni pli riskas ne saviĝi, se oni troviĝas en bruldanĝero. Kaj se oni lasas sian korpon putri, estas pli granda risko, ke oni ekhavos kanceron, kaj oni povas tiel putrigi sian propran korpon.

Eĉ se temas pri mikroestuloj, ili efektive ne estas malpli grandaj. Domoj for ĉe la horizonto ŝajnas malpli grandaj, sed ili estas tiom grandaj kiom la domoj ĉi tie. Kiam ni laŭ kosma vidpunkto rigardas malsupren, ni tion nomas mikrokosmo. Sed la mikrokosmaj estuloj estas tiom vivaj kaj tiom grandaj, kiom ni. Ne estas diferenco, ĉar ili ne havas grandecon. Tion ili havas nur laŭ nia vidpunkto kaj sensado. Tial same gravas mortigo de malgrandaj bestoj kiel mortigo de grandaj bestoj.

**Demando 7B:** *Kian karmon rezultigas tio, ke ni tre ofte nekonscie mortigas bestetojn kaj tiajn aferojn? – Ĉu tio donas malbonan karmon?*

**Martinus:** Sed tion ni ne povas eviti, tiukaze ni ne povus paŝi tie ĉi sur la herbo. Estas tamen kelkaj hindoj, kiuj estas tiom fanatikaj ke ili ne povas promeni libere. Sed tiu karmo tute ne gravas, ĉar estas tiom da alia karmo kiu venas antaŭ ĝi. Estas tuta vico, ja, la karmo vere staras en vico, sed se oni estas ĝoja kaj en tre bona humoro, la bona karmo venas. Tial mi rekomendas bonan humoron.

Ekzistas nur unu ordono, tio estas la kvina ordono: “Ne mortigu”. Ĉiuj la aliaj ordonoj estas nur ombraĵoj de tiu ordono. Se oni sin pikas per pinglo, oni tie ion mortigas. Kaj se oni malĝojigas homon, oni ankaŭ ion mortigas. Homoj pensas ke oni rajtas mortigi bestojn, ke

oni rajtas mortigi sian mikromondon, kaj ke oni rajtas lasi sian kadavron enteriĝi kaj lasi ĝin putri. Sed ĉi ĉio estas mortigo kaj detruado de vivo kaj estas malobeo de la kvina ordono. Sed oni ja devas pardoni la homojn pri tio. Nur nun ili devas komenci ĉion ĉi lerni.

Atendas grandega evoluo, precipe por tiuj homoj, kiuj trapasis la grandan karmon. Mi distingas inter grandkarmo kaj aliaj formoj de karmo. Homoj, kiuj jam finis militi, kiuj ne plu volas batali kaj ne povas mortigi, murdi aŭ fari tiel malicajn aferojn, ili trapasis la grandkarmon.

Nun tiuj homoj devas antaŭeniri al la kosma pensmaniero, kaj nun venas por tio la tuta mondbildo kun grandaj, lumaj ondoj. Se oni volas tion studi kaj klopodi vivi laŭ ĝi, oni povas sperti ĝojon, kaj ne nur tion, oni povas laŭtempe atingi ricevon de kosmaj ekbriloj. Kelkaj homoj rakontis al mi: *"Kiam mi estas malĝoja, mi legas en Livets Bog, kaj tiam mi ĝojiĝas".*

Ankaŭ estis juna viro 30-jaraĝa, kiu venis al mi kaj diris, ke li estas tre malĝoja. "Kio vin malĝojigas?" – Nu, li iĝis 30-jaraĝa kaj li ne ekhavis kosman konscion! [granda rido] – "Tion vi ja ne ekhavas ĉar vi iĝas 30-jaraĝa". Sed li opiniis ke tion mi skribis. Sed, tion mi ne skribis; mi skribis, ke kiam oni estos sufiĉe evoluinta por ekhavi kosman konscion, tiam ĝi venos je la aĝo de 28-30. Tio estas kutima afero. Sed li pensis ke ĉiu homo, kiu iĝas 30-jaraĝa, ekhavas kosman konscion. Tial li estis malĝoja, sed oni ja pardonu al li tion.

## 8. Temoj: florplukado, la vivo en la beatoregno

**Demando 8A:** *Kiam oni plukas florojn, oni ja difektas iliajn organismojn ...*

**Martinus:** Ĝuste, sed ne doloras al la planto, ĉar ĝi povas senteti nur agrablon kaj malagrablon. Se vi imagas ke vi fermas la okulojn, vi povas senti agrablan varmon de la suno, kaj vi povas tiel senti la varman sunon. Simile la planto povas nur senteti, ĉar ĝi ne povas sperti konscie. Vi povas vidi ke la planto sin fermas vespere kaj malfermas sin matene. La plantokorpo cetere estas celata al sperto de la plej granda detruiĝo, ĉar ne estas iu organismo kiu detruiĝas pli ol la planto. Oni tranĉas ĝin kaj faligas arbojn ktp. Kaj oni ja bezonas tion fari.

**Demando 8B:** *En Usono oni esploris kiel plantoj reagas, se iu disŝiras ilin. Oni metis elektrodojn sur la florojn kaj lasis vicon da homoj preterpasi, kaj montriĝis, ke la floroj reagis kiam la "murdinto" preterpasis.*

**Martinus:** Antaŭ multaj jaroj estis en Barato profesoro nomita Bose. Li havis grandan instituton, kiun vizitis Gerner Larson. Profesoro Bose estas la unua, kiu malkovris ke la planto reagas kiam oni tranĉas aŭ tranĉetas ĝin. Li konstatis ke estas vibrado, kiun li kredis esprimo de doloro. Anna Ørnsholt, kiu estis nia reprezentanto en Barato, estis lia sekretario dum dek jaroj. Kiam mi vizitis ŝin [1954], ŝi diris: *"Ni malkovris, ke la planto havas doloron".* Mi do devis atentigi ŝin pri tio, ke ĝi ne havas tion. Ĝi havas vibradon, kiu iam iĝos doloro, sed ĝis tiam ĝi estas nur senteto.

Ke mi tiom emfazas ke oni ne tranĉu florojn, do ne estas pro tio ke la floroj spertas doloron, sed ĉar mi opinias ke estas stranga moro. La evoluinta homo ne estas tiel brutala ke ĝi povas detranĉi florojn. Kelkaj homoj ĵetas en la tombojn detranĉitajn florojn. Tio estas stranga afero, ĉar ja temas pri vivaĵo. Nur pro tio ke la floroj ne povas multe senti tion, oni ja ne detruu vivon.

Povas esti okazoj, kiam detranĉitaj floroj estas bona afero. Se homo kuŝas en malsanulejo dum monatoj kaj ne

vidas la belan someron, tiu homo ĝojiĝas se oni alportas belan bukedon.

Kaj tion la plantoj povas senti, ili povas senti agrablon. Estas virinoj kaj certe ankaŭ viroj, kiuj povas kreskegigi siajn plantojn. La planto estas tre ricevema



al radioj, sed ĝi ne povas prianalizi kio estas kio, ĉar eĉ la plej evoluinta planto ne havas inteligenton. Ĝi ja ne povas verki librojn pri siaj spertoj. La tre primitiva planto fakte povas sperti agrablon estante detruata. Kiam ekz. la herbo estas tranĉata, ni ja sentas agrablan odoron, kaj ĝi estas odoro de la beatoregno.

La planto povas en la fizika sfero nur senteti, ĉar ĝi estas tagokonscia en la beatoregno en la spirita sfero. En la beatoregno la granda avido pri la estonto estas veni malsupren en la fizikan vivon por ekhavi novan konscion. Oni ne povas evolui en la spirita sfero, sed oni povas variigi sian konscion. Nian scion kaj niajn spertojn ni povas variigi kaj kombini laŭ novaj manieroj, sed estas sur la sama nivelo kaj ne sur pli alta nivelo.

Ni devas iri al la fizika sfero por ekhavi novajn spertojn kaj lerni pensi logike, ĉar tie ĉi en la fizika mondo la materio ne obeas la penson. Ĉi tie artisto devas uzi martelon kaj ĉizilon, kiam li volas ĉizi artaĵon el la marmoro aŭ la ŝtono, kaj kiam ni volas konstrui domojn, ni devas segi ktp. Sed kiam oni tion lernis en la fizika sfero, oni scias kiel fari tion. En la spirita mondo oni do povas pensi ke oni faras skulptaĵon aŭ konstruas domon, kaj ĝi ekaperas, ĉar en la spirita mondo la materio obeas la penson. Sed se oni ne venus en la fizikan sferon, oni ne povus evoluigi novan konscion.

Ni havas eternan vivon, konservatan de tio ke ni spertas kaj la luman kaj la malluman flankojn de la spiralo. En la malluma flanko nia konscio estas evoluigata ĝis kiam ni iĝos "la fina homo je la bildo de Dio". Atinginte la bildon de Dio, ni trairos la pli altan parton de la spiralo kaj tie vivas en la plej altaj mondoj kun arto kaj scienco. Estas tiel nekredebla afero, ke mi mem, eĉ per mia plej forta fantazio, ne povas troigi, tiel diece estas.

Sed post tio la konscio malkreskas denove. Se ni havus nian plej preferatan manĝon ĉiutage kiam ni manĝas, ni ja iun tagon pete krius por manĝi ion alian. Kaj same estas kiam oni venas en la altajn sferojn, kie ĉio estas dieca, kaj kie estas nenio alia ol lumo kaj ĝojo. Fine, la sensoj preskaŭ mortas, kaj oni komencas sopiri al la malo. Oni sopiras al la mallumo kaj eĉ al mortigi kaj murdi.

Estas tiel saĝe konstruite, ke la fina zono en la kosma spiralo estas ĝuste la zono de la memoro. Nun la memorkapablo de la homoj troviĝas tre proksime

al la latenta aŭ plej malgranda stadio. Multaj homoj ja kapablas memori nur tre malmulton kompare kun tio, kion ili povis antaŭe. Tial ili devas skribe noti aferojn ktp., sed en la beatoregno ili povas memori la tutan spiralon. Ili povas memori kiam ili estis arbo en la arbaro, kiam ili estis besto, kaj kiam ili estis homo. Kaj tiam en la beatoregno ni povos memori ke ni sidis tie ĉi.

En la beatoregno ĉiu spertas sian propran internan mondon. Tio, kion mi spertas en mia beatoregno, estas miaj propraj memoraĵoj, kaj tiel ĉiu havas siajn proprajn memoraĵojn. La beatoregno estas sfero, kie ni havas la okazon percepti, kiel Dio vivas en sia propra granda universo. Ni havas memoron pri la tuta universo, kiun ni kunportas al la spirita sfero. Ni havas memorojn pri tio, ke la terglobo estas ronda, pri ĉielo kaj tero, maro kaj grundo, kaj pri galaksioj kaj ĉio tio. Ni povas tion rememori estante meze de la memoraĵoj, kaj ni povas iri antaŭen kaj malantaŭen tra tempo, ekz. malantaŭen al tiam, kiam ni estis bestoj. Ni estas komplete suverenaj tie en nia propra memoruniverso.

Ni tiel povas iri antaŭen kaj malantaŭen tra tempo, kaj vi povos rememori la tempon dum kiu ni sidas tie ĉi, kaj se la memoro estos forta, vi povos reaŭskulti tion, kion mi diras nun. Ŝajnas fantaziaĵo, sed estas vero. Estas tiel diece ke mi ne povas troigi la aferon. Kaj estas multe pli ol tio, kion mi povas rakonti. Se la homoj scius kio ilin atendas, estus grandega inspiro eklabori. La homoj ja mem povas helpi; ili devas ja nur ekscii kiel, kaj ĉu indas la peno [multa rido]. Sed indas esti bonkora kaj ama.

**9. Temo: La kosma konscio de Martinus**

Mi ja ne fanfaronu pri mi mem, sed mi estas preskaŭ devigata tion fari [granda rido]. Mi dum 30 jaroj estis tiom nescia pri la kosmaj aferoj kiom multaj aliaj homoj [granda rido]. Mi ne havis la scion pri la kosmaj aferoj, kiun mi nun havas. Sed mi havis scion ke oni estu bonkora kaj ama, kaj Kristo estis mia idealo. Kiam mi ne sciis ĉu io estas ĝusta aŭ malĝusta, mi pensis: "Ĉu Kristo farus tion?" – Tio estis granda gvido. Mi povis senti: "Ne, li ne farus!", aŭ mi sentis: "Jes, tion li povus fari!". Tio tiel iĝis mia gvidilo dum 30 jaroj, ĝis kiam mi ekhavis mian propran konscion, ekde tiam mi ne plu bezonas tion. Nun mi scias kion mi povas, kaj kion mi devas.


Sed mi ne rajtas nur koncentri mian konscion al mi mem, nek al aliaj privataj homoj, ĉar tiukaze mi povus fari nenion alian ol esti divenisto. Mi kapablas tion fari, sed mi tion ne faras. Do, mi ne scias kiu mi estis. Homoj demandas: "Kiu vi estis? Kio vi estis en pasintaj vivoj?" Mi ja scias nenion pri tio, mi nek iel interesiĝas pri la afero. Mi ankaŭ respondas: "Sed, tio havas nenian gravecon". Tio, ke mi ekhavis mian propran konscion je la aĝo de 30, tio estas la grava afero, ĉu ne? – Ĉu mi estis tiu aŭ tiu dum pasintaj vivoj, tio ja estas tute negrava. Kial oni sciu tion?

Originale dana titolo: Spørgetime, Gardenparty på Villa Rosenberg, juli 1973. Kosmos n-ro 8, 2009.

Traduko Mathias Dalmose 2013.

# La geedzeco

de Martinus



**1. La feliĉa geedzeco estas bazita sur organe enkonstruita aŭtomata funkcio kiun gvidas ĉiorega instinkto**
En nia tempo la homoj vivas en mondo plena de problemoj, kaj iuj el la plej grandaj kaj plej malfacilaj amasiĝas en la regiono de la geedzeco. Malfeliĉaj geedzecoj kaj divorcoj ne plu estas esceptoj. Pli komencas esti tiel ke esceptoj estas tiuj homoj kiuj dum longa tempo vivis kune en feliĉa geedzeco. Sed kio estas la kaŭzo ke la tera homo vivas en tiu zono kiun mi nomas la zono de la malfeliĉaj geedzecoj?

La problemo estas tre profunda, kaj por vere kompreni ĝin ni devas direkti nian konscion al la besta regno, ĉar tie ni trovas la elirejon de ĉiuj principoj kiujn mi prilumas ĉi tie. En la bestoregno la kunvivado inter du estuloj el mala sekso estas la paradizo mem. En tiu paradizo ne okazas interveno de inteligento aŭ konscia volforto. La feliĉa geedzeco estas ĝisfunde bazita sur organe enkonstruita aŭtomata funkcio kiun gvidas ĉiorega instinkto. Kiam la idoj maturiĝas kaj povas zorgi pri si mem, tiam ili animiĝas de avido kiu kondukas ilin al estulo el mala sekso, kiun simile regas tia avido. Ili fakte fariĝas vivkondiĉo unu por la alia, ili ne konas ion alian por kio vivi, ili ne havas aliajn avidojn kiuj kreas plian animan avidon. En la periodo de seksardo la reciproka avido plene posedi la geedzon estas la bazo en la sinkonserva instinkto de tiuj estuloj. Kia ajn klopodo interveni en ĝin kaŭzas ĉe la virestulo furiozan ĵaluzon kombinitan kun kompleta maltimo pri morto. Tiu kunvivado estas la paradizo mem en la vera bestoregno, kaj tion kantas al ni miloj da etaj gorĝoj en la printempo kiam la suno, lumo kaj varmo revenas, kaj la arbaroj kaj kampoj verdiĝas. Estas ĝuste glorkantoj honore al la geedzeco kiujn ni aŭdas en la fajfado de la sturno kaj en la triloj de la alaŭdoj, turdoj kaj najtingaloj. Tiu tuta kantanta arego estas gardanĝeloj por ĉiuj etaj estuloj kiuj en formo de siaj idoj enkarniĝos el la spirita sfero. Tiu belega birdokantado en la printempo kaj en la frua somero, do efektive estas vivesprimoj de "paradizo" kun ĉiosuperbrila ĝojkantado de "anĝeloj" honore al la eterna ĉiopotenca Dio.

**2. La teraj homoj nun spertas la elpelon el la paradizo. Ili manĝis la fruktojn el la arbo de sciado**
Sed kiel estas por la teraj homoj, ĉu ili troviĝas en la sama paradizo? Ne, ili ĝuste nun spertas "la elpelon el la paradizo". "Ili manĝis el la fruktoj el la arbo de sciado je bono kaj malbono", kaj tio signifas ke ili ne plu bazas sian vivon ekskluzive sur aktivado de instinktaj aŭtomataj funkcioj, sed komencis mem influi la strukturon de la vivo pere de sia vekiĝanta tagokonscia kaj inteligentoinfluata volo. Oni komencis havi la intereson mem partopreni la kreadon, kaj tiu intereso kreskis tiom ke ne plu estas, kiel ĉe la besto, nur la neston aŭ kavernon kiun oni deziras formi, sed

pli aŭ malpli altgrade oni deziras agi ankaŭ sur kampoj tute ekster la geedza kunvivado. Oni do ne plu tute sekvas la leĝojn de sia animala organa strukturo, sed pli kaj pli bazas sian vivon sur sia vekiĝanta inteligento. La pensanta kaj kreanta tera homo ne plu estas estulo kiu hejmas en la paradizo de la bestoj, kvankam periode, precipe kiel juna homo, ĝi travivas ekbrilojn de ĝi kiam ĝi estas enamiĝinta al estulo de mala sekso. En la daŭro de tempeto enamiĝintaj homoj travivas "la perditan paradizon", kaj pro influo de la ebrio de la enamiĝo ili ofte opinias ke tiu stato restas eterne, almenaŭ tutan vivon, kaj ili geedziĝas kaj ricevas infanojn, sed iun tagon ili eble spertas ke ili ne havas ion alian komunan ol la ricevitaj infanoj. Eble unu el ili (aŭ ambaŭ) enamiĝas al iu alia persono kaj opinias, ke kune kun li aŭ ŝi la vivo estus plena feliĉo anstataŭ kune kun la geedzo. Ili divorcas, kaj ili eble ĉiu por si denove geedziĝas por post iom da tempo ekvidi ke ankaŭ tiu geedzeco ne fariĝis tiu idealo kiun ili kredis. La infanoj fariĝis divorcinfanoj, kaj se ili estas sentemaj ili spertas disiĝon kaj senradikecon en sia vivo, kaj tio povas esti granda sufero kaj doloro por ili.

### 3. La teraj homoj estas transiraj estuloj inter besta stato kaj homa stato

Sed kial tio ke la homo komencas pensi kaj krei, influas ĝene ĝian kapablon vivi centprocente feliĉan kunvivon kun geedzo? La kaŭzo estas ke kaj psike kaj fizike la teraj homoj estas submetitaj al proceso de transformo. Kvankam ilia organismo daŭre estas mambesta organismo ili ne plu estas veraj bestoj, kaj ankoraŭ ili ne estas veraj homoj. Ili estas transiraj estuloj inter besta stato kaj homa stato kun iom de la energifunkcio de ambaŭ zonoj en siaj konscio kaj organismo. Dum miloj da birdaj gorĝoj elsendas glorkantojn pri la paradizo de la bestoj, tiam la estulo ploranta pro tiu partnero kiu perfidis kaj estis malfidela kaj foriris kun iu alia, estas estulo eligita el la paradizo. Ĝi troviĝas ekstere en la mallumo, kaj la malfidela edzkunulo ekvidas iom post iom ke ankaŭ ne ĉe la nova partnero la absoluta feliĉo estis trovebla. Tiuj estuloj ne plu povas travivi la paradizon de la bestoj alimaniere ol en feliĉaj ekbriloj, kaj ili ankaŭ ne havas intiman rilaton kun ia pli alta paradizo. Kion la dia mondplano povas diri al tiaj estuloj?

### 4. La kosma polusprincipo

Ĉiuj varioj de malfeliĉaj statoj en la seksa regiono, kaj sekve ankaŭ en la multaj malfeliĉaj geedzecoj kiujn la homoj de la tero nuntempe suferas, ili radikas en la kosma principo kiun en miaj analizoj mi nomas la polusprincipo. Ĉe la vivaj estuloj en la universo tiu principo realigas la evoluon de ĉia konscivivo sur ĉiuj mensaj evoluŝtupoj. Ĝi kondiĉas ke ilia sorto estas luma aŭ malluma, ke ili aperas kiel virestulo aŭ inestulo, aŭ kiel estulo kun ekvilibro inter sia maskla kaj femala polusoj kaj kiu sekve reprezentas evoluŝtupon kiun la tera homo ankoraŭ ne atingis en sia nuntempa evoluspiralo. Neniu tera homo estas centprocente viro aŭ centprocente virino. La centprocente masklaj kaj femalaj estuloj troviĝas en la vera bestoregno kie la mala poluso en la estulo estas latenta. Ĉe ĉiuj viroj kaj virinoj de la tera homaro la mala poluso evoluas. Por la viroj tio estas la femala poluso, kaj por la virinoj la maskla poluso. Tiu poluskonstelacio kaŭzas ke iliaj konscio kaj interesosfero partiĝas tiel ke ili fariĝas speco de duobloestuloj. En la seksa regiono ili daŭre estas submetitaj al sia pariĝa instinkto. Tiu instinkto daŭre ekzistas en ilia konscio kiel speco de prainstinkto, kaj ĝi kondiĉas ilian intereson pri la parula principo kaj ilian dependecon de ĝi. Sed ilia konscio havas ankaŭ alian parton, kaj ĝi estas parto

kiun la besto ne havas. Tiun parton reprezentas pensado, scio, ideoj, interesoj pri sociaj aferoj, religio, arto, tekniko kaj scienco ktp. Kaj ĉio tio neniel rilatas al la generado. La admiro kaj intereso pri la geedzo povas okupi pli aŭ malpli grandan parton de la konscio de la tera homo, sed ne tiom ke virino povas atendi plene posedi sian edzon, same kiel viro ne plu povas kalkuli plene posedi sian edzinon.

**5. Por la teraj homoj la geedzeco estas unu el la plej grandaj elprovoj, ĝi estas spirita ŝlifilo**

La tera homo do havas interesosferon kiu kondiĉas ke ĝi estas besto, kaj ĝi havas novan flankon, novan interesosferon kiu montras ke ĝi survojas por fariĝi alia estulo, vera homo. En sia konscio la teraj homoj havas primitivan staton kiu estas degeneranta, kaj flankon kiu evoluas, kaj estas certe ke tiuj du statoj konfliktas unu kun la alia kaj tial facile elvokas funebron kaj suferon. La enamiĝinta tera homo kiu estas reamata, ĝi travivas dian renkontiĝon kun la ĝardeno de la paradizo, ĝi ricevas animalan travivaĵon de “la granda naskiĝo”, tio signifas internan mensan staton de ekvilibro kie ĉio brilas en dia lumo. Tiu totale feliĉa unuiĝo estas tio kion ni nomas feliĉa geedzeco. Sed normale tiu enamiĝo ne daŭras. Ordinare oni ne renkontas homojn kiuj estis konstante enamiĝintaj unu al la alia dum ekzemple kvardek jaroj. Male estas tiel ke la vivo konfirmis la kulminon de la enamiĝo kiel limigita fenomeno. Tiun kulminon oni nomas miela tempo. La longo de tiu periodo kompreneble povas varii de tagoj kaj monatoj al jaroj, kaj dum ĝi la homo travivas lastan saluton de la brila paradizo de forpasinta zono. Kiam aperas tiu periodo de enamiĝo malpli forta, tiam la demando estas ĉu la reciproka amikeco kaj la komunaj interesoj, kaj ne malpli la amo al la infanoj, havas tiel grandan forton ke la geedzoj povas vivi en harmonia kunesto bazita sur tiuj homaj ecoj. Miloj da homoj ne havas paciencon por provi tion, sed elĵetas sin en novajn kontaktojn kie post iom da tempo ili eble ankaŭ averias, kaj kie ili kaŭzas al si iom malagrablan sorton en venontaj vivoj se ili perfidas la antaŭan geedzon kaj la infanojn. En la nuna tempo la geedzeco estas unu el la plej grandaj elprovoj por la teraj homoj, ĝi estas spirita ŝlifilo kiu kunefikas por forŝlifi la krudajn kaj akrajn randojn de la terhoma konscio. Laŭ homeco la geedzeco estas laborejo, kaj tiu kiu deziras labori pri sia propra evoluo havas tie tre grandajn eblojn por venki multe de sia egoismo. Ne eblas eviti ke homo montras siajn malpli simpatiajn flankojn al siaj intimuloj, al tiuj kun kiuj ĝi kunestas ĉiutage. Tial ankaŭ en la geedzeco necesas kompreno, toleremo kaj homeca amo, kaj estas ja ĝuste tiuj ecoj kiuj fariĝos gravaj faktoroj en la konsciaktivado de la vera homo. Kompreneble povas esti cirkonstancoj tiel gravaj, ke unu el la partneroj, eĉ kie estas infanoj, necese devas uzi la malnovan esprimon “Se vi iros maldekstren, mi iros dekstren”, kaj tiam estas plej bone se oni povas venki tiun malamon aŭ tiun amaron kiu eble kolektiĝis en la konscio kontraŭ la alia partnero. Efektive la partnero estas ilo pere de kiu oni mem rikoltas tion kion oni iam mem semis.

**6. La laŭgrada evoluo de la mala poluso en la konscio estas travivata kiel nia homeca interesosfero**

Kiam la tera homo proksimiĝas al sia trideka jaro ĝiaj konsciorganoj estas tute evoluintaj kaj ĝia periodo de ripetado de antaŭaj vivoj preskaŭ finas. En tiu periodo ĝia nova interesosfero komencas vere influi, kaj tiam la geedzecaj malfacilaĵoj ofte komenciĝas. Povas okazi ke unu el la geedzoj ekvidas flankon ĉe la alia kiun ĝi ne mem posedas, kaj tio povas

kaŭzi ĵaluzon. Multaj geedzoj ĵaluzas pro la interesoj de la alia. En multege da interparoloj kun homoj kiuj venis al mi, mi havis okazon observi tiujn aferojn kaj vidi kiujn funebrojn kaj animajn krizojn ili kaŭzas. Por mi estas grave atentigi pri tio, por ke pere de tio vi povu pli bone lerni kompreni vian geedzon. Kompreni sian geedzon signifas ĉi tie kompreni lian aŭ ŝian pensmanieron. Estas grave lerni kompreni ke kiam oni edziĝas oni ligas sin al homo, kiu krom sia intereso pri la alia, havas ankaŭ en sia konscio flankon de interesoj kiuj ne koncernas ĝin. Miaj kosmaj analizoj donas al vi tiun instruon ke kiam oni venas en geedzecon oni efektive edziĝas al "ĝemela estulo". Tiu nocio ĝemelo ne estas el fizika speco, ĝi estas psika, kaj estas gravege ke la homoj ekkonas ĝin iom post iom laŭ tio ke ili homece maturiĝas. En sia konscio ĉiu viro havas "ĝemelan fratinon", kaj same ĉiu virino havas en sia konscio "ĝemelan fraton". Ili sekve kunportas "ĝemelon" en sian geedzecon, kaj tion la plej multaj homoj ne scias. Tiu ĝemelo estas bazita sur la laŭgrada evoluo de la mala poluso en la konscio, kaj ĝi estas travivata kiel nia homeca interesosfero. Ne estas la maskla poluso ĉe la viro kaj la femala poluso ĉe la virino kiuj kreas la plej grandajn malfacilaĵojn en la geedzecoj de nia tempo. Kontraŭe la femala poluso de la viro kaj la maskla poluso de la virino faras niajn nuntempajn geedzecojn ne solidaj.

**7. Laŭ tio ke la nova interesosfero kreskas en la estuloj, la avido de enamiĝo subfosiĝas**

Kial nuntempe tiom da homoj eniras en aron da seksaj rilatoj kiam ilia enamiĝokapablo tamen estas degeneranta? Ĉar ili daŭre enamiĝas al novaj partneroj, do estus kredeble ke male al degenero ilia enamiĝokapablo kreskus. Sed tiuj enamiĝoj. ne estas veraj enamiĝoj kiel tiuj kiuj okazas en la jaroj de juneco. Ili estas speco de anstataŭigo. Kiam degeneras la enamiĝokapablo, kaj kiam la komenciĝanta interesosfero ne estas sufiĉe forta por porti la konsciaktivadon de la estulo, tiam povas okazi ke la homo klopodas renovigi sian kapablon de enamiĝo per daŭra serĉado de nova partnero. Ĝi ne konas la kosmajn fortojn malantaŭ sia propra stato, sed iom post iom ĝi lernas koni ilin. Laŭ la kresko de la nova interesosfero en la estuloj subfosiĝas la inklino de enamiĝo. Dum la besto daŭre travivas la inklinon de enamiĝo en formo de ritmaj periodoj de seksardo, ni vidas kiel la sama inklino ĉe la tera homo pli kaj pli reŝoviĝas al la jaroj de junaĝo. Laŭ ĉiu vivo per kiu pliaĝiĝas la tera homo, tiu inklino ripetiĝas pli kaj pli frue. Aperas certa stadio en la jaroj de vera junaĝo dum kiu oni travivas la geedzan principon ĝis perfekto. Ĝi animas la tutan konscion ĉar ĝi estas ripetado. En tiu tempo la estulo ankoraŭ ne atingis tiun spiritan maturon al kiu ĝi evoluis en sia antaŭa vivo. Sen scio pri tiu fakta cirkonstanco ĝi sentas sin konvinkita pri tio ke tiuj sentoj kiujn ĝi nun havas estas vivodaŭraj, kaj ĝi edziĝas por eble poste vere penti tion. En la venonta mondkulturo la homoj lernos koni sian propran naturon, kaj oni instruos ilin pri tio kio necesas en la geedzeco, kaj kiujn kondiĉojn la tera homo devas plenumi por povi krei harmonian geedzecon. Tiu problemo nome ne solviĝas per atesto pri geedziĝo ekspedita de eklezia aŭ de civilaj aŭtoritatoj. La sola portanta bazo por vivi en harmonia geedzeco estas la anima kontakto kaj la komunaj interesoj. Se tiuj kondiĉoj plenumiĝas la atesto pri geedziĝo esence estas superflua.

*Originale dana titolo de 1942 estas "Ægteskabet". La dana prilaboro de la manuskripto fare de Mogens Møller estas aprobita de Martinus. Traduko Ib Schleicher, 2000.*

# Letero al N.N. pri familia vivo kaj sekseco


Kara N.N.
Dankon pro via amoplena letero de la 22-a de junio. Jen mi sendas al vi kelkajn provizorajn vortojn, sed tamen ne kiel finan respondon al via letero. Mi opinias, ke estus pli bone, se ni povus iom interparoli rilate al via problemo, kiam vi post mallonge alvenos ĉi tien al la feria vilaĝo.

Havi infanojn en ama kaj feliĉa geedzeco kompreneble estas en kontakto kun la dia volo. Kiom da infanoj la geedza paro deziras, kompreneble estas io, kion ili devas decidi sen ajna formo de devigo aŭ premo.

Se oni ne deziras krei fekundiĝon per la sekskuniĝo, estas absolute preferinde ĝin rezigni. Uzi la sekskuniĝon kaj senkonscience saboti la pro ĝi sekvantan dian gravedecon per ĉiaj teruraj metodoj – oni ja eĉ ne cedas estingonte la etan delikatan homan vivon, kies kreadon Dio ĵus komencis en la patrina ventro. Ĉi tiuj fetomortigoj kaj infanmurdoj en la patrina ventro, estas nenio malpli ol mortigaj flamoj de la juĝotaga infero, kiu jam delonge furiozas tra la mondo. Ili montras la velkadon de la mosea kulturo kaj la naskiĝon kaj kreskon de la kristaneco  kiel vivkondiĉan realaĵon.

Se geedza paro ne deziras, ke ilia seksa kunkuŝado kreu fekundiĝon aŭ gravedecon, kial do uzi la specialan bestan metodon, per kiu la spermo transiĝas de la virseksulo al la inseksulo dum la pariĝa kuniĝo. – Tiu dia travivaĵo el altkosma volupto aŭ plezurspertado, kiu akompanas plenrealigitan pariĝan kuniĝon, ne dependas de la miljara tradicia metodo kiu manifestiĝas en la sekskuniĝo. Ĝi estas, en sia reala malfalsa naturo, facile aktivigata ĝis kulmino ĉe ambaŭ partneroj pere de reciproka karesado, se la partneroj vere amas unu la alian. Sed la homoj ne konscias, ke tiu metodo pli kaj pli montriĝos la solvo de la estoneco. Jen la kaŭzo de ĉi terura sinkrampado al la miljare rutina sekskuniĝa metodo, pro kies konservado oni jam en la patrina ventro sabotas la dian kreadon de “la homo laŭ lia bildo simila al li”.

Kaj per tio, korvarme salutas



Traduko Henning Sato von Rosen 2013

KOSMOS 1939, n-ro 11, p. 86



# Martinus 11
## La agnoskemo de la homaro rilate al la nova mondimpulso 3

de Erik Gerner Larsson

La studo de la hodiaŭa menso de la tuta surtere vivanta homaro montras, ke estas eble al ni rilate al la nova mondimpulso dividi ĉi-tiun homaron en du, rilate unu al la alia, severe diversaj grupoj. Al ĉi-tiuj grupoj Martinus donis la distingilojn A kaj B. En la unua de ĉi-tiuj grupoj ni renkontas ĉiujn, kiuj dank' al ilia agnoskemo pri la nova mondimpulso, forlasis la antikvajn ideojn rilate al religiaj demandoj ne estantaj centprocente sciantaj pri la nova spirita mondbildo. En la grupo B troviĝas do ĉiuj, kiuj ankoraŭ agnoskas la hodiaŭajn ĝenerale valorantajn religiajn perceptojn. [Vidu Livets Bog §120-123].

Ĉar estas la reprezentantoj de grupo A kies konantiĝo en ĉi-tiu rilato plej multe interesas al ni, tiam Martinus dividis ĉiujn individuojn en ses diversaj fakoj por faciligi la komprenon de la skemo pri la tenado de ĉiu aparta individuo rilate al la scio, kiun la nova mondimpulso alportos. La fundamento de ĉi-tiu divido estas la reciproka konstelacio de la du bazaj energioj, la sento kaj la inteligento, en la menso de ĉiu aparta individuo, ĉar estas ĝenerale spertita fakto, ke la analizo de la kunagado de ĝuste ĉi-tiuj du energioj en la konscio rakontas al ni pri nia religia tenado. Se estas tiel, ke ĉi-tiuj du energioj laboras harmonie kune, jes, tiam ni renkontas, ĉi-tie la unuan kategorion en grupo A. Ĉi-tiu homtipo plej multe karakteriziĝas de sia silentema, ama tenado. Ĉiam tolerema kaj ĉiam komprenema, ni renkontas ĉi-tie la plej fortajn reprezentantojn de la venonta vera homaro. Dank' al ĉi-tiu "silenteco", kiu regas en la interno de ĉi-tiuj homoj oni neniam trovos mankon de kuraĝo por vivi laŭ tio, kion ili konsideras ĝusta, tial oni ankaŭ ĉi-tie renkontas la plej valorajn praktikantojn de la vera kristaneco. Eĉ se estas tre tenta profundiĝi en detala priskribo de reprezentantoj de ĉi-tiu kategorio, mi devas ĉi-tie atentigi pri "La Libro de la Vivo". Ĉi-tiuj artikoletoj, – kiujn mi penadas similigi tiom multe kiom eble al la ĉefverko de Martinus, ke ili en si mem nur estas konsiderindaj kiel provo de mallongigo de la enhavo de ĉi-tiu verko per citatoj kaj mallongigoj – nur intencas instigi al la leganto studadon de miaj propraj fontoj.

Dum oni povas diri, ke en la anima vivo de la unua kategorio regas kvazaŭ permanenta silenteco kaj paco, ĉi-tio ne absolute troviĝas ĉe la reprezentantoj de la dua kategorio. La sento ne ĉiam ekvilibriĝas kun tiu porcio de inteligenteco, kiu estas necesa por konservi ĝin interne de la kadroj de la vera amo, kaj ni renkontas ankaŭ ĉi-tie la unuajn postsignojn de tiu veneno de la netoleremo, kiu detruas tiom da bela religia travivado. Pro iu en periodoj aperanta supereco de la sento, la reprezentantoj de la dua kategorio de tempo al tempo estas kaptataj de la kaptiloj de la ambicio. Ĉar la rezultato de ĉi-tio nur povas

fariĝi travivaĵo de seniluziiĝo sen tio, ke tiu, kiu mem travivas la seniluziiĝon konscias pri la kaŭzo de ĝi, – ni ĉi-tie renkontas la reprezentantojn de la imagita religia martireco.

Ĉar ĉi-tiu situacio kaŭzas pesimismon kaj melankolion kun respektivaj subefikoj en la fizika korpo, ankaŭ ĉi-tie la nobla en la menso de ĉi-tiuj homoj rapide superregos, tiel ke ni ankaŭ ĉi-tie alvizaĝigas kun eminente spirite evoluintaj homoj.
(Daŭrigota.)

Traduko Margrethe Noll en 1939.

---

# Klarigo al la frontpaĝa simbolo n-ro 66

**La homo en la perfekta pensklimato**
La fizika korpo konsistas el la ses kampoj, kiuj estas montrataj en la simbolo. La instinktenergio, kiu estas simbolita per la ruĝa koloro, reprezentas la muskolaron kaj la haŭton. La pezenergio markita per oranĝkoloro reprezentas la stomakan regionon. La sentoenergio markita per flava koloro, kreas sentoenergian stelmondon en la brusto- kaj spirregiono kaj en la sango. La inteligentoregiono markita per verda koloro estas en la cerba regiono, kaj la intuicia regiono markita per blua koloro estas en la kampo de la seksaj organoj. La regiono de la memorenergio markita per indiga koloro estas en la skeleto kaj la minerala regiono.

La simbolo montras homon kun du polusoj, el kiuj la mala poluso kreskas al la ordinara poluso, kaj kiam la du polusoj kuniĝos, tiam la homo fariĝos la ideala homo laŭ la bildo de Dio. La polusoj kreskas al unuiĝo ĉe ĉiuj neperfektaj homoj.

Ni tie ĉi vidas, ke ĉio estas kia ĝi estu. Estas pura inteligentenergio, pura sentenergio, pura pezenergio, pura intuicienergio, pura memorenergio kaj pura instinktenergio. Tiuj ĉi energioj aŭ materioj estas radike fiksitaj, kaj ili kontribuas al la konsistigo de materialo en la diversaj sistemoj, ekz. stomako, pulmoj, sango ktp. La energioj kreas stelnebulon malsupre en la mikromondo.

La Eterna Mondbildo, vol. 5, par. 66.3,
Traduko Mathias Dalmose





# Profetaĵoj pri Martinus 3
## Uri Geller kaj Puharic

de Ole Therkelsen

**Uri Geller kaj la anoncado de "La libro de scio"**

En 1974 Martinus kun granda intereso legis la libron Uri Geller verkitan de Andrija Puharic (Rosenkilde og Bagger, Kopenhago 1974). La usona originala eldono havas la titolon "U R I" kaj la subtitolon "La originala kaj aprobita biografio de Uri Geller – la viro kiu konfuzas la sciencistojn" (W.H. Allen, Londono 1974).

Martinus en La Libro de la Vivo 1 multe skribas pri la nova mondimpulso kiu niatempe trairas la teron kaj treege akcelas la evoluon. En pluraj prelegoj Martinus precizigis ke aparte fortaj impulsoj venis ĉirkaŭ la jaroj 1900, 1920 kaj 1973. Pro la unua impulso en 1900 liberiĝis la scienco kaj la teoria fiziko, kaj pro la dua impulso en 1920 liberiĝis la kosma scienco. Sen ĉi tiu makrokosma impulso en 1920 Martinus tute ne ekkapablus ekkrei sian spiritan sciencon. (Kosmos n-ro 7 kaj 8/2009).

Pro la impulso de 1973 liberiĝis la mistikaj, okultaj kaj spiritaj aferoj. Unu manifestiĝo de ĉi tiu impulso estis la televida prezentado de Uri Geller, kie li montris siajn kapablojn legi pensojn, kaj kie li kurbigis tranĉilojn, kulerojn kaj forkojn per mensa forto. Martinus mem sentis tion kiel konfirmon de siaj analizoj pri demateriigo kaj remateriigo.

En la libro pri Uri estas profetite ke unue la amiko de Uri, Shipi, kaj poste Uri mem, trovos La Libron de Scioj (The Knowledge Book).

Al Geller kaj Puharic la "eksterteranoj" prezentis la koncepton de Dio lige al naŭ principoj: "Dio estas nenio alia ol ni kune, la naŭ principoj de Dio. Estas neniu Dio krom tio kio ni kune estas."

Same kiel ĉe Martinus oni povas diri ke la Dio estas esprimebla same per iuj teoriaj principoj kiel per vivantaj estuloj, danke al respektive la principo de triunuo kaj la principo de vivunuo. (Vidu poste).

Iun tagon kiam Geller kaj Puharic iris al la skribotablo, ili supriziĝis ekvidante ke naŭ skriboplumoj mem movas sin kaj metas sin en difinitan ordon, kies signifon ili ne komprenis. La skriboplumoj metis sin laŭ ĉi tiu desegno:



Laŭ la analizoj de Martinus oni eble povus ekhavi ideon, pri kiuj naŭ principoj temas. La pensoj unue iras al la simbolo de Martinus pri la strukturo de la vivanta estulo, kie li montras la 6 bazajn energiojn kiel ses striojn kaj la 3 principojn en la principo de la triunuo kiel triangulon. (LEM1, simbolo n-ro 6).

Ĉiu unuopa estulo same kiel la vivanta universo, la diaĵo, estas konstruitaj laŭ la sama eterna principo de triunuo, kiu konsistas el "la kreinto" (X1, la mio aŭ la dia io), "la kreokapablo" (X2, la eterna povo de la mio krei kaj sperti) kaj "la kreaĵo" (X3, la rezulto de la uzo


de la kreokapablo fare de la kreanto). Ĉiuj vivantaj estuloj kaj Dio do havas la saman strukturon de triunuo, reprezentitan per la tri principoj: “La kreanto, la kreokapablo kaj la kreaĵo”.

Ĉio monda aŭ kreita, ĉio kion oni povas senti aŭ travivi, ĉia vibro, movo aŭ energio laŭ Martinus estas kombinita el la 6 bazaj energioj, al kiuj li donis la jenajn nomojn: instinkt-, pez-, sent-, inteligent-, intuici- kaj memor-energio.

Martinus desegnis specialan simbolon pri la diversaj kombiniĝoj de ĉiuj 6 bazaj energioj, klarigitan en LEM1, par. 12.1-12.3 kaj en LB2, par. 358-441.

**La uzo de Martinus de la esprimo ‘libro de scioj’**

Legante pri la libro de scioj, Martinus ekopiniis ke tia libro povas esti nur lia Libro de la Vivo. – *La Libro de la Vivo* ja estas *La Libro de Saĝo*, kiu pruvas ke ĉio estas tre bona. Ĉu eblas doni pli bonan klarigon de la ekzisto? – Ĉu ekzistas pli alta klarigo de la vivo ol ke ĉio estas esprimo de amo? – Martinus opiniis ke por ke libro estu libro de scioj, ĉiuj ĝiaj analizoj devas akordi kun la amo kaj montri ke oni ĉie pardonu kaj estu bona kaj amema en ĉiuj rilatoj de la vivo.



*Uri Geller*

Ŝajnas ke Martinus tiom ekŝatis la esprimon libro de scioj ke li mem komencis uzi ĝin. Tio okazis interalie en 1975, kiam li en la parolado de sia 85-jara naskiĝtago priparolis la libron pri Uri Geller.

Martinus diris: “La filozofio kiun ili alportas, kongruas kun tio kion mi diris, kaj ili respondas la samajn demandojn kiujn mi respondis. Kaj ili ankaŭ antaŭanoncas la estontan libron de scioj. – Sed kio estas *La libro de scioj*? – Tio devas esti libro de amo, alie ĝi ne estas libro de scioj. Ĉar la libro de scioj devas esti la plej granda. Amo kiu ne estas scio, ne estas amo. Kaj scio kiu ne estas amo, ne estas scio. Devas esti grandega harmonio kaj logiko en la tuto.” (Mosesepoken og kristusepoken [La mosea kaj krista epokoj], Kosmos, n-ro 7/2005).

La unuan fojon kiam Martinus uzas prese la esprimon libro de scioj estas en 1979, dum li skribadis la manuskripton de prologo por la Libro de la Vivo, la Tria Testamento, kiu estis eldonita nur en 2004 inter aliaj postlasitaj manuskriptoj. Dufoje en ĉi tiu prologo li skribas pri la libro de scioj.

Martinus: “Ĉi tiu ‘Parakleto, la Sankta Spirito sendota de la Patro’ kaj anoncita de Kristo do estas ia ‘libro de la vivo’ aŭ ‘de scioj’, manifestota al la homaro. Sed efektiva ‘libro de la vero’ pri Dio kaj la universo povas nur konsisti el daŭrigo de la kosma monda kulturo iniciatita de Kristo antaŭ preskaŭ du mil jaroj sub la koncepto ‘kristanismo’.” (La Intelektigita Kristanismo, par. 6).

Martinus skribas ankaŭ: “La Tria Testamento do estas libro ‘de saĝo’ aŭ ‘de scioj’. Ĝi estas rivelo de la eterna radiado de la ‘ĉioamo’. Ĝi siavice konsistas el la rivelo de tiu “bildo de Dio”, en kiu ĉiuj vivantaj fizikaj estuloj estas kreataj en reenkarniĝo aŭ renaskiĝo. Ĉi tie en la Tria Testamento ĉiuj nefinitaj estuloj, tio estas “fizikaj estuloj”, bestoj

kaj homoj egale, riveliĝas esti sur la sama vojo, vojo kiu neŝanceleble kondukas al "kosma konscio" kaj per tio al la travivado de la ora aŭreolo de la universo, la ora lumo, la eterne vivanta parto de la vivantaj estuloj, kaj per tio al "kristokonscio" kaj "unuiĝo kun Dio" (La Intelektigita Kristanismo, par. 6).

Traduko Jens Stengaard Larsen 2013

## NOTOJ

**Eo-semajno en Martinus-Centro en 2014**
Inter la 26-a de julio kaj 2-a de aŭgusto 2014 la Esperanto-semajno en Klint okazos paralele kun dana, sveda, angla, germana kaj hispana kursoj en internacia etoso. Matene estos interpretata prelego, poste studrondoj, posttagmeze estos konversaciaj rondoj. En la vespero estos prelego en Esperanto aŭ distra programo, ankaŭ estos teo kaj kukoj en la restoracio *Terrassen*.

**Abonilo 2014: Senpaga Eo-Kosmos**
Senpage, du foje jare (en marto kaj oktobro) Esperanto-Kosmos publikiĝos en elŝutebla formato ĉe la adreso: www.martinus.dk/eo. Rete kaj retpoŝte vi ankaŭ senpage povos aboni Eo-Kosmos kiel alkroĉitan pdf-dosieron. Sendu vian peton al la Eo-adreso de Martinus-Instituto: esperanto@martinus.dk.

Ne plu eblos pagi kaj aboni paperan version de Kosmos pere de makleroj aŭ UEA-konto. Sed laŭ speciala interkonsento vi povos aboni paperan Kosmos, se vi kapablas pagi rekte al bank-konto de Martinus-Instituto.

*Ole Therkelsen*

INFORMO PRI

### LA TRIA TESTAMENTO

La celo de la revuo Kosmos estas doni enrigardon en tiun mondbildon, kiun la verkisto Martinus (1890-1981) priskribis en vico da libroj kun la kumuna titolo: La Tria Testamento.
La mondbildo de Martinus estas logika analizo de la spiritaj leĝoj kaj principoj de la vivo. La nova mondbildo estas studebla per la libroj de Martinus, kiuj eldoniĝas de la Martinus-Instituto, kaj per prelegoj, kursoj, studrondoj kaj informoj en la interreto. Okazas aktivecoj en la Martinus-Instituto en Kopenhago, en la Martinus-Centro en Klint ĉe Nykøbing Sjælland, en aliaj lokoj en Danio kaj eksterlande. Pliajn informojn oni ricevas kontaktante la Martinus-Instituton. La disvastiĝo de la konoj pri La Tria Testamento okazas sen ia formo de membreco aŭ kreado de asocio.

Eldonanto: Martinus-Instituto
Mariendalsvej 94-96
DK-2000 Kopenhago
Tel: (+45) 38 34 62 80
fakso (+45) 38 34 61 80
Telefontempo:
lundo-ĵaŭdo 13-16
vendredo: 9-12
DK p.ĝiro 642-9580
www.martinus.dk
esperanto@martinus.dk
shop.martinus.dk

Redakcio: Ole Therkelsen (respondeca), Mathias Dalmose kaj Jonas Dalmose.
Kompostado: Dan Elhaûge.

Abono: Jare 2 ekzempleroj
Prezo: DKK 100,00
Unuopa kajero: DKK 50,00

Kopirajto: © Martinus Institut
Redono de teksto nur laŭ skriba permeso.
Presita de Martinus Institut
ISSN 1600 4116.


www.martinus.dk/eo/la-revuo-kosmos/elsutebla-esperanto-kosmos/

Martinus Institut

Titolpaĝo
La Kosmologio
La literaturo
La simboloj
Kursoj kaj prelegoj
La revuo Kosmos
Abono
Elŝutebla Esperanto-Kosmos
Martinus-Centro Klint
Read Martinus' works
Aliaj serĉoj
Librovendejo
Language

# Elŝutebla Esperanto-Kosmos

**KOSMOS** estas spirit-scienca revuo de Martinus-Instituto, ĝi aperis la unuan fojon en dana lingvo la 1-an de aprilo 1933. Nuntempe Kosmos aperas ĉiumonate en la dana kaj la sveda, kaj ĝi aperas kvarfoje jare en la angla, la nederlanda kaj la germana.

La Esperanta versio de Kosmos aperis iom neregule dum kvar periodoj 1946-1947, 1958-1959, 1969-1974 kaj ekde 1995 ĝis nun. En kelkaj periodoj Eo-Kosmos aperis kvarfoje jare, kaj nuntempe dufoje jare, sed espereble pli ofte estontece. Laŭ deziro de Martinus la revuo Kosmos en iom fora estonteco aperos samtempe kun la sama enhavo en diversaj lingvoj.

Ne plu eblos pagi kaj aboni la paperan version de Kosmos pere de makleroj kaj UEA-konto. Sed laŭ speciala interkonsento [esperanto@martinus.dk] vi povos aboni paperan Kosmos, se vi kapablas pagi rekte al bank-konto de Martinus-Instituto.

**Abonu Eo-Kosmos kiel pdf-dosieron**
Retpoŝte vi senpage povas aboni Eo-Kosmos kiel alkroĉitan pdf-dosieron. Sendu vian peton al la Esperanto-adreso de Martinus-Instituto: esperanto@martinus.dk. Klaku ĉi tie por sendi retmesaĝon

Klaku ĉi tie por elŝuti la revuon Kosmos en Esperanto:

2013-1 2012-2 2012-1
2011-2 2011-1 2010-2 2010-1
2009-2 2009-1 2008-2 2008-1

Dufoje jare (en marto kaj oktobro) vi povas elŝuti novan Eo-Kosmos, tute senpage!

Kontakti Nova mondbildo Pri la Kosmologio de Martinus

Printi Superrigardo © Martinus Institut

**Senpaga Esperanto-Kosmos**

**1.** Du fojojn jare vi libere povos elŝuti la Esperanto-version de Kosmos ĉe la reta adreso de Martinus-Instituto:

**www.martinus.dk**

**2.** Retpoŝte vi ankaŭ senpage povos aboni elektronikan version de Eo-Kosmos, se vi sendos vian peton al la Eo-adreso de Martinus-Instituto:

**esperanto@martinus.dk**